# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**

**PLENUMITA 25/02/2021 Kvincentdeknaŭa eldono (unua eldono 20/09/2011)**




## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *reta-vortaro* *Freelang Vortaro* *Plena Ilustrita Vortaro* *Duolingo* *Google Translate* *Pasintaj AE eldonoj* *duolingo entute* *lingvohelpilo* *Esperanta Retradio* *Esperanta himno* *PMEGramatiko* *openclipart.*

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au


## Entute 820,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **294,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **243,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **219,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas **64,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde junio 2021)

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*

## EKSTRAĴOJ ĈE LECIONO EL LA "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).




**N.ro 24 de "Por Komencantoj"**.



La specialeco de la afiksoj aperas ankaŭ klare en la kunmetoj kun la sufikso "-umi", kiuj vortoj ofte havas abstraktan signifon de la konkreta, kiel en "plenumi (*fulfill*)" el "pleni (*fill*)" kaj en "brulumi (*inflame*)" el "bruli (*burn*)".

Ĉar la prefikso "dis-" signifas "for en ĉiaj direktoj ("for" = en unu direkto), ne uzu la sensencaĵon "disde" por la angla "*from*", kiu "disde" signifas "el al ĉiuj direktoj", neeblaĵo. Uzu por la angla "*from*" la ĝustan "el de" kiu signifas "*out of the realm of*": "Li venis el de la patro". *Marcel Leereveld.*

## Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

https://twitter.com/i/status/1245591199034929153

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***



# La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo, kunvenas de 10.30 atm ĝis 12tm la unuan kaj trian sabatojn de la monato.Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater Cafe 28-29 Suda Stejno. La ĉeestantoj tie diskutas la plej sekuran lokon por la kunveno laŭ la vetero kaj homamasoj. La 20a de februaro estis la tria sabato.

Unu taso da klubpagita kafo atendis vin

Sabaton, la grandaj nuboj montris belan spektaklon sur la ĉielo. Distance, kurtenoj de pluvo falis en la maron sed bonŝance kie ni sidiĝis la pluv-ombrelo de Roĝero restis fermita kaj dum la mateno la suno ekbrilis denove.



Ni havis legadon pri la sezonoj do la lingvo certe vivis por la okazo. *Chris Holliss*

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



## N i  p a r o l a s,  k a j  p a r o l a s,  k a j  p a r o l a s.

Antaŭ sesdek jaroj, do post ol loĝi dek jarojn en la lando, mi decidis ke la du plej malbonaj aspektoj, por kiuj mi do elmigros al alia lando, estas unue la elcentra muŝo, kaj due la sistemo de privataj lernejoj. Kompreneble ĉeestas pluraj bonaj kaj bonegaj aspektoj de Aŭstralio, sed tiuj du malbonaj estas multe pli malbonaj ol kelkaj aliaj malbonaj aspektoj. La malagrablaj muŝoj estas science ekstermeblaj, sed la aŭstralianoj preferas svingadi la manon daŭre al la vizaĝo por forpeli la necedantajn muŝojn. Mi tre malŝatas muŝojn, ĉar ili sidas sur aliies lipoj antaŭ ol eksidi sur miajn lipojn, kaj mi ne deziras kisati de nekonataj personoj.






Sed la preskaŭ same naŭza sistemo de privataj lernejoj malrapide sed certe disvastiĝadis en Aŭstralio dum la lastaj cent jaroj. Mi spertis la sistemon, ĉar mi instruis dum tridek jaroj en privataj lernejoj. La sistemo dividas Aŭstralion en du Aŭstraliojn, la pli gravan kaj pli potencan Aŭstralion de tiuj kiuj uzis la privatajn lernejojn, kaj la malgravan kaj senpotencan Aŭstralion de tiuj kiuj uzis la publikajn lernejojn. Ambaŭ klasoj de aŭstralianoj konscias ke ili apartenas aŭ al la pli grava kaj pli ilustra parto de Aŭstralio aŭ al la pli malgrava kaj malpli valora parto. La anoj de privatlernejoj posedas la kulturon kaj la bonpagitajn gvidajn postenojn, kaj la aliaj iru rigardi piedpilkadon kaj ricevas la malbone salajritajn okupojn. Kaj tiu dividiĝo montriĝas ĉie en la socio: ekzemple unu Liberalpartia reprezentanto en Melburno postulis ke "Ni devas reteni la Dandenongs areon por loĝigi la riĉulojn". Mi diskutis kun lernantoj de privataj lernejoj la sistemon, kaj ili ĉiam menciis ke ili uzas tiajn lernejojn por ekhavi amikojn inter la alta socia klaso, ankaŭ por ricevi la pli alte salajritajn postenojn en la socio. Ili ne elektas studi ekz. medicinon ĉar ili ŝatas la laboron, sed nur por ricevi pli bonan salajron kaj por ricevi pli da statuso. Mi instruis en kvar el la plej famaj privataj lernejoj.



***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

Tiu segregacio zorgas, ke tre kapablaj studantoj en la malalta socia klaso ne ricevas la gvidajn postenojn. Dum la ĵusaj kvin aŭ dek jaroj ĉi tiu fakto estas diskutata de kelkaj specialistoj pri eduka scienco. Ili indikas ke tia situacio estas malbona por la bonfarto de la socio, kaj ke ĝi malutilas al la prospero de la lando. Ili diras ke ĝi "malutilas al la ŝancoj por karieroj" kaj "por la socia mobileco". Ili indikas, ke la grandaj kompanioj devas dungi malaltklasajn sed tre kapablajn personojn por kelkaj el siaj gvidantaj postenoj. Sed la kompaniegoj plejparte plu dungas altklasanojn por siaj gvidantaj postenoj. Nova libro pri tiuj problemoj estas "*The End of Aspiration? Social Mobility and our children's fading Prospects*" (La fino de aspiracio? Socia mobileco kaj la malaperantaj prospektoj de niaj infanoj), de *Duncan Exley*. Jen do mia naŭzo de unu aspekto de Aŭstralio, ne ĉeestanta en eŭropaj landoj. *Marcel Leereveld.*

## NI PAROLAS, KAJ PAROLAS, KAJ NUR PAROLAS .

Leginte la ĵusan A.E.-on, kaj la antaŭajn, kaj la ĵurnalojn, mi konstatas ke ni, la verkantoj por A.E., kaj la komunumo ĝenerale, nur parolas kaj parolas kaj parolas. Ni plendas kaj plendas kaj plendas. Kaj ni laŭdas tiujn kiuj parolas kaj parolas kaj parolas. Mi estas parto de tiu komuna "ni".

Tiu parolado kaj parolado kaj parolado, tiu plendado kaj plendado kaj plendado, estas necesa, sed kie estas la konkretaj agoj por eviti la militojn? Ĉu ni ne devas eĉ pli aŭdi pri la pli necesaj agoj kiujn ni faras? Evidente ni lasas la laboron por eviti militojn al nur eta grupo en niaj komunumoj. Ĉu ni ne ĉiuj devus agi por nia paco? Ne nur paroli kaj paroli kaj paroli. Mi mem estas kompreneble parto de tiu inerta plimulto.

En nia gazeto A.E. estas unu escepto, kvankam modesta, ĉar ne admonante sed nur proponetante ke ni aniĝu al la movado "*World Beyond War*" ("Mondo Sen Milito"). Tiu "aganto" estas *Roger Springer*. *Marcel*.

**ENIGMO**. Se ni uzas la sentempan sufikson "-at-" por la Pasiva Voĉo, Esperanto estas perfekta en sia uzo de tempaj sufiksoj por Verboj kaj por Participoj. Ankaŭ la angla (kaj franca, k.t.p.) estas perfekta lingvo: se ĝi volas indiki agon kiu okazas nun, sen okazi antaŭ nun, ĝi uzas nur verbojn aŭ participojn kiuj indikas la nunon. Ĉu ankaŭ en "*The letter is now being returned*"? La klarigo aperos en la sekva A.E. *Marcel Leereveld.*

## Kial la interretaj kontrolistoj avertas

ke ĉi tiu kontraŭ milita ligo estas danĝera?

Subtenu Mondon sen Milito

World BEYOND War <info@worldbeyondwar.org>



Estas mona afero. Mono, Mono kaj Mono



*Roger Springer*

**_Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE_**

# Kio estas Mono? 
Ĉu mono estas la havebla energio en la mondo? Uzo de la rezervejo de energio de antaŭaj jaroj Oleo? Gaso? Karbo? Atomo? riĉigas la homaron, **sed bedaŭrinde ne ĉiujn, kaj detruas la planedon.**

# Universala baza enspezo (UBI)




## Por pli kontentiga kaj sekura mondo

Universala baza enspezo (UBI) estas simpla ideo: perioda konstanta pago senkondiĉe transdonita al ĉiuj individuoj, sen rimedo-testado aŭ labora postulo. *Roger Springer*

**Tio helpos solvi multajn nunajn problemojn de la tuta Homaro**.

Lernu de hieraŭ, vivu por hodiaŭ, esperu morgaŭ.
La grava afero estas ne halti demandadon. **Albert Einstein**



Aŭstraliaj esperantaj korespondantoj dezirataj. Mi ĵus realiĝas al UEA. Bonvolu sendi mian retadreson al viaj membroj kiuj deziros korespondi. Mi estas nur meznivela esperantisto. Mi uzas epoŝton ĉar epoŝto estas pli malmulte kosta kaj pli rapida. Mi estas maljuna emerita kolegio- instruisto avo Ed Arnold el Mishigano Usono. Plaĉas al mi ekscii pri via vivo kaj kulturo. avoed@mail.com

# TRO DA POPOLO ESTAS MALBENO

Je 2/11/2019 eldoniĝis en *The Post (respektinda komunuma ĉiusemajna ĵurnalo en Perto)*, ĉi tiu letero al la redaktisto, verkita de John Massam, Prezidanto de ELOA.

Loĝantoj en la regiono en kiu cirkulas la *Post,* kaj ankaŭ en aliaj lokoj, kontraŭas la *'infill'* planojn de la ŝtata registaro, pro tio, ke tiuj planoj difektos la ĉarmajn lokojn en kiuj multaj el ili loĝas.
(*Infill*: ekspluato de malgrandaj konstrulokoj en establitaj antaŭurboj, por mezdensaj loĝkompleksoj, cele al efektivigo de pli efika utiligo de ekzistanta urba bazinstalaĵo - v.p.).



La plimulto de la homaro ne volas kredi ĉi tion, sed popola troaĵo estas unu ĉefa kialo por la fervora enspezo fare de konstru-entreprenistoj kaj aliaj, per disbato de ĉarmaj domoj kaj poste konstruo de blokoj da apartamentoj kaj aliaj kompleksoj.
Mi alvokas al homoj kiuj kampanjas kontraŭ sensencajn kreskado-politikojn, kontroli interretajn lokojn kiaj ekzemple mondpopolaro-horloĝoj.

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

Unu el tiuj interretaj lokoj taksas, ke ĉirkaŭ la jaro 2000 a.K. estis 50 milionoj da homoj, kaj ĉi tiu nombro kvarobliĝis dum la sekvantaj 2,000 jaroj. En 1804 p.K. la nombro kreskis ĝis 1,000 milionoj (unu miliardo), kaj en 1927, du miliardoj. Demandu al vi mem: ĉu estas iu urĝa kialo por ke hodiaŭ homoj nombru 7 miliardoj?

Ĉu ne estus pli bone se ĉiu registaro kuraĝigu iompostioman popolo-malkreskadon, konsciante, ke krudmaterialoj kaj subtera akvo (kiujn urbegoj kiaj Perto utiligas malŝpareme) neeviteble grade mal- kaj malplios?

Se ĉiu riĉa lando farus transmarajn donacojn al malriĉaj landoj kondiĉe ke tiuj komencu progamon kiu certigos nur du infanojn per familio, la premo je malgrandigantaj rimedoj iom post iom malpliiĝus. Kompreneble, ankaŭ riĉaj landoj nepre devus praktiki tiajn politikojn.

Studu la faktojn, pripensu ilin, kaj sciigu ilin al viaj ŝtataj kaj federaciaj politikistoj kaj lokaj konsilantoj.

(Tradukis kaj sendis al AE Vera Payne) *John Massam,*

## Aliĝu al UEA

Saluton Aŭstralia Esperanto-Asocio,

Danke al via laboro, granda parto de niaj membroj el 2020, jam realiĝis por 2021. Mi elkore dankas pro via agado. Espereble vi sukcesos konvinki ankoraŭ multajn personojn realiĝi aŭ aliĝi al UEA. Ĉiuj personoj, kiuj estis membroj de UEA en 2020 daŭre havas aliron al la servoj de UEA, sed plej malfrue **ekde la 1-a de marto 2021** membroj de 2020 ne plu povos ensaluti la retejon UEA.ORG, ricevi aŭ elŝuti la novajn numerojn de la revuo Esperanto (TEJO-membroj – ankaŭ revuon Kontakto), konsulti retan Jarlibron kaj aliajn internajn informojn.

Se vi, en la venonta tempo, ricevas novajn kotizojn, bv. sendi spezofoliojn laŭeble ĝis la 27-a de februaro 2021. Supozeble ĝis tiu dato, ni devas liveri la adresliston por la poŝta dissendo. Kompreneble ankaŭ personoj, kiuj aliĝas nur poste, ricevos la revuojn, sed povas esti iom da malfruo. Dankon pro via kunlaboro.

Se vi havas demandojn, bv. ne heziti, kontakti min.



Amike *Martin Schäffer* Ĝenerala Direktoro de UEA

## El Brisbano





***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

https://www.facebook.com/groups/brisbane.esperanto.society/permalink/3485960494835483/?sfnsn=mo

# Brisbane Esperanto Society

Informis AE *Petro Danzer*

"Estas du malsamaj specoj de homoj en la mondo, tiuj, kiuj volas scii, kaj tiuj, kiuj volas kredi.\

## 3ZZZ



Mi tre bedaŭras ke pro teknikaj problemoj, la elsendo de la 22a de februaro ne klare aŭdeblis el la studio, do ne povas esti arkivigita en la retejo de la Melburna Esperanto-Societo. .

*Franciska Toubale*

La tialo pro kiu mankas informo pri via klubo estas ke via klubo ne sendis ĝin al AE




*Renato Corsetti*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***